

Ŝlosilo de Ĉinesko

Guozhu



e-Librigita de Elerno

Ĉinio 2007

Biblioteko de Ĉinesko

Antaŭparolo

1973, Ĉinio en t.n. Granda Kultura Revolucio. La jaroj 1966 ĝis 1976 pli poste estis nomata de ĉinoj kiel Katastrofa Jardeko, karakteriza per ampleksa glacikovrado kaj silentado tra la vasta lando. Tamen honestaj ĉinaj esperantistoj, sub gvido de la verda stelo, ankoraŭ persistas en brava luktado. En junio de 1973, en n-ro 2 de iu mimeografita revueto <El Ĉinaj Esperantistoj (EĈE)>, aperis kvar fiksfarmaj poemoj laŭ ĉinesko *Sopir-al-Sudo*, versitaj de Guozhu. Tiuj esperantaj poemoj aparte okulfrapis per unueca fiksa formo, tute konforma al la skemo de ĉina ci-o *Sopir-al Sudo* je la nombroj de versoj, silaboj kaj rimarangoj. Tio fariĝis la starta punkto de ĉinesko, inaŭgurante ĝian komencan periodon en malfaciloj. Siatempe preskaŭ neniu ekster Ĉinio sciis pri tiu evento.

Fakte <Sopir-al-Sudo> ne estis la unika inter ĉinaj fiksfarmaj poemoj. Nombro de ĉinaj fiksfarmaj poemoj estis tiel abunda ke ĝi eĉ superis 2000. La sukcesa eniro de <Sopir-al-Sudo> en Esperantan poezion aludas teorie ke la aliaj pli ol 2000 skemoj de ĉinaj fiksfarmaj poemoj ankaŭ havas la saman rajton kaj eblecon eniri Esperantan poezion. Necesas firmpaŝaj laboroj en praktiko. Ĉinaj esperantistoj devkonscie plenumis la historian mision.

En julio 1990, inaŭguriĝis la beletra revuo **Penseo**, konata per sia ĉina trajto. Ekde sia unua numero **Penseo** klopodis por konigo kaj disvastigo de ĉineskoj internacie kaj tio daŭriĝis ĝis hodiaŭ en la nova 21-a jarcento. Ekkoninte ĉineskon, la granda poeto **William Auld** estis tiel entuziasmigita ke li verkis favoran recenzon <*Ekjuku la poeta mano*> kaj esprimis sian bondeziron ke :
“**Mi esperas, ke la tria eldono de Esperanta Antologio enhavu originalajn Ci-ojn ankaŭ de poetoj ne ĉinaj.**” (Fonto 175, p.29)

21-a jarcento bonvenigas la epokon de Interreto. La 17-an de novembro 2006, fondiĝis **rubriko Ĉinesko** en la hejmpaĝo de forumo de **eLerno**. La rubriko servas kiel bazloko kaj scenejo, kaj en ses monatoj tie aperas novaj aŭtoroj de centoj da novaj ĉineskoj. Aperas sinsekve ankaŭ kvin poemkolektoj de ĉineskoj en formo de elektronika libro (eLibro) titolita <**Ĉineske**>, kun ĝojinda bunteco kaj en la poema formo kaj en la enhavo. Prenante tiujn ĉineskojn kiel ekzemplojn, Guozhu kompilis tiun ĉi <**Ŝlosilo de Ĉinesko**>, kiu servas kiel gvidlibro kaj ties 128 specimenoj ankaŭ kiel eta antologio de ĉineskoj. Ni humile dediĉis ĝin al la granda familio de internacia Esperantujo, kaj kore bondeziras ke la bela espero de William Auld realiĝos kiel eble pli frue.

Guozhu 2007-06-17 en Wuhan, Ĉinio.

Ŝlosilo de Ĉinesko

1. Poemo, verkita laŭ skemo de ĉina fiksforma poemo (ekz-e: *ci*-oj), estas nomata **ĉinesko**.

2. En ĉina poezio, la skemoj de la fiksformaj poemoj estas tiel multaj, ke la sumo eĉ superis 2000, tamen, el kiuj la plej ofte uzataj, nombris ĉ. 50.

3. Ĉiu ĉinesko havas sian propran nomon, kiu servas ĉefe (aŭ nur) por indiki la fiksforman skemon, sed ne kiel titolo de la poemo.

Tial, diversaj poemoj, verkitaj laŭ la sama ĉinesko, devas havi tute saman fiksformon, sed, samtempe, tute povas havi la plej diversajn malsamajn enhavojn.

4. Nomon de ĉinesko ni skribas per Hanlingva Fonetika Alfabeto (HFA). Ĝi aperas ofte en la (vic-) titolo de la poemo, sube de la poemtitolo, kiu ankaŭ tre ofte tute ne aperas.

ekz-e: Laŭ ĉinesko *Shiliuziling*

Uzo de laŭsence esp-igita nomo estas permesata, sed libera, ne deviga.

ekz-e: Laŭ ĉinesko *Dekses-silabo*

Do ni enmetu ĉitie en nia ŝilosilo ankaŭ la originalan nomon de ĉinesko en ĉinaj ideogramoj, por eventuala esp-igo laŭ bontrovo de verkantoj.

5. Esperanta ĉinesko redonas jenajn form-karakterizaĵojn de la originala samnoma ĉina fiksforma poemo:

(1) Nombro de strofo(j).

(2) Nombro de versoj.

(3) Nombro de silaboj en ĉiu verso.

(4) Nombro de rimoj.

(5) Rimaranĝo.

6. La skemon ni skribas jene:

(1) Per ciferoj, kiuj indikas la nombron de silaboj en verso.

(2) unu cifero por unu verso

(3) ciferoj por senrimaj versoj estas kune skribitaj.

ekz-e: 43 signifas ne kiel "kvardek tri silaboj en unu verso" sed kiel "du versoj senrimaj, el kiu la unua enhavas 4 silabojn, la dua verso enhavas 3 silabojn."

(4) ciferoj supre\malsupre skribitaj indikas elekteblajn variantojn.

ekz-e: 4\3 la verso enhavas aŭ 4 aŭ 3 silabojn.

(5) post cifero de kunrima verso estas komo [,]. Tamen, ĉar la lasta verso de ĉiu strofo ĉiam estas kunrima, tial, ne estas tie superflua komo.

(6) per punktkomo [;], kiu indikas rimŝanĝigon.

(7) per /, kiu dividas forme malsamajn strofojn, dum la du samajn strofojn ni indikas per ()²

(8) per asterisko [*], kiu indikas ripeton de la vorto(j).

- (9) per du asteriskoj [**], kiu indikas palindromon.
 (10) per literoj post ciferoj, kiuj indika rimaranĝon, rimŝanĝiĝon.
 (11) per litero x por senrima verso.
 (12) per majusklo, kiu indikas ripeton de la rimo.
 ekz-e: signifas la skemo de shiliuziling 1,7,35 ke
 la unua verso: 1 silabo , kunrima
 la dua verso: 7 silaboj, kunrima
 la tria verso: 3 silaboj, senrima
 la kvara verso: 5 silaboj, lastvice kunrima

Skemoj de Ĉinesoj 简明词谱 (Laŭ alfabeto vico)

B(1),C(4),D(4),F(2),G(2),H(5),J(3),K(1),L(3),M(2),
 N(3),P(2),Q(4),R(3),S(11),T(6),W(1),X(6),Y(14),Z(5)

En la subaj skemoj estas donataj sinsekve

Nomo de ĉinesko en HFA, ekz-e **Busuanzi** / originala nomo en ideogramoj, ekz-e 卜算子/ esperanta nomo, ekz-e **aŭguristo** / [numero de strofo(j) : 2– numero de silaboj :44 – numero de rimoj: 4] / signoj pri fiksformo: (55,75)x2

Busuanzi : ĉina fiksforma poemo konsistanta el du strofoj same el versoj de 5, 5, 7, 5 silaboj kun duona rimo.

Busuanzi 卜算子 aŭguristo [2-44-4] (55,75)x2

Caisangzi 采桑子 moruskolektanta knabino [2-44-6] (74,4,7)x2

Chaitoufeng 钗头凤 feniksa harpinglo

[2-60-14] (3,3,7;3,3,44,1,1*,1*)x2 | aaa;bbxbbBB

Changxiangsi 长相思 longa sopiro [2-36-8] (3,3,7,5)x2

Chaozhongcuo 朝中措 pedanta klerulo [2-48-5] 7,5,66/444,66

Daolianzi 捣练子 kanto de lavantino [1-27-3] 33,7,77

Dianjiangchun 点绛唇 ruĝigitaj lipoj [2-41-7] 47,4,5/45,34,5

Dielianhua 蝶恋花 papilio super floroj [2-60-8] (7,45,7,7)x2

Dingfengbo 定风波 subigo de ŝtormo[2-62-11] 7,7;7,2;7;/7,2;7;7,2;7 |aabba/ccdeed

Fendieer 粉蝶儿 papilio [2-72-8] (10,34,334,36)x2

Fengrusong 风入松 vento inter pinoj [2-76-8] 7,5,734,66/ 7,5,77,66

Genglouzi 更漏子 kanto de akva horloĝo en nokto

[2-46-8] 33,6;33,5;/33,6;33,5 | xaa;xbb/xcc;xdd

Guizhixiang 桂枝香 aroma laŭrbranĉo[2-101-10] 4,54,64,734,444/7,54,64,734,444

Haoshijin 好事近 proksimiĝas bona afero [2-45-4] 56,65/75,65

Heshengchao 贺圣朝 gratulo al sankta dinastio [2-49-6] 7,5,75/44,5,75

Hexinlang 贺新郎 gratulo al novedzo[2-116-12]5,344,76,7,78,33/7,344,76,34,78,33
Heyebai 荷叶杯 lotusfolia taso [1-23-6] 6,2;3;7,2;3 | aab ccb
Huanxisha 浣溪纱 silk-lava rojo [2-42-5] 7,7,7/77,7

Jiangchengzi 江城子 riverborda urbo [2-70-10] (7,3,3,45,733)x2
Jiangnanchun 江南春 printempo sude de rivero [1-30-3] 33,55,77
Jianzi Mulanhua 减字木兰花 mallogigita melodio magnolia[2-44-8] 4,7;4,7;/4,7;4,7

Kuxiangsi 酷相思 profunda sopiro [2-64-10] (7,33,8,33,33)x2
Langtaosha 浪淘沙 ondo lavas sablojn [2-54-8] (5,4,7,74)x2
Linjiangxian 临江仙 feo ĉe rivero [2-56-6] (66,7,55)x2
Litingyan 离亭燕 hirundo ĉe kiosko [2-76-8] (66,76,56)x2

Manjianghong 满江红 rivero plenruĝa [2-93-9] 434,344,77,353/33,33,54,77,353
Moyuer 摸鱼儿 fiŝado [2-116-13] 346,76,3,37,4,545/36,6,76,3,37,4,545

Nangezi 南歌子 suda kanto [1-23-3] 55,7,9
Nanxiangzi 南乡子 sudlandano [2-56-8] (5,7,72,7)x2
Niannujiao 念奴娇 ĉarma kantistino [2-100-8] 436,436,445,46/654,436,454,46

Pozhenzi 破阵子 kavalira danco [2-62-6] (66,77,5)x2
Pusaman 菩萨蛮 budhista dancisto [2-44-8] 7,7;5,5/5,5;55 |aa bb cc dd

Qingpingyue 清平乐 serena muziko [2-47-7] 4,5,7,7;/6,6,66 | aaaa bbb
Qingyu'an 青玉案 verdjada taso [2-68-8] (7,33,7,445)x2
Qinyuanchun 沁园春 printempo en la Ĝardeno Qin
[2-114-9] 444,5444,447,354/6,35,5444,447,354
Queqiaoxian 鹊桥仙 feino sur piga ponto[2-56-4] (446,734)x2

Renyueyuan 人月园 rondiĝo de luno kaj homoj [2-48-4] 75,444/444,444
Ruanlangui 阮郎归 reveno de amato [2-47-8] 7,5,7,5/33,5,7,5
Rumengling 如梦令 kvazaŭsonĝe [1-33-5] 6,6,56,2,2*,6

Santaici 三台词 tri terasoj [1-24-2] 66,66
Shanhuazi 山花子 monta floro [2-48-5] 7,7,73/77,73
Shaonianyou 少年游 vojaĝo en juneco [2-50-5] 7,5,445/75,445
Shengshengman 声声慢 lanta sontreniĝo[2-97-10]4,46,64,634,336/6,36,46,634,37
Shengzhazi 生查子 monta kratago [2-40-4] (55,55)x2
Shiliuziling 十六字令 dekses-silabo [1-16-3] 1,7,35
Shuyidiaogetou 水调歌头 preludo de akva melodio
[2-95-8] 55,65,665,55/333,47,665,55
Shuilongyin 水龙吟 akva drako[2-102-9] 67,444,444,5433/6,34,444,444,544
Siyuanren 思远人 sopiro al fora homo [2-51-5] 75,445/7,5,545
Sumuzhe 苏幕遮 virina ĉapo [2-62-8] (33,45,7,45)x2

Suzhongqing 诉衷情 kora sento [2-44-6] 7,5,65/33,3,444

Taichangyin 太常引 [2-49-7] 7,5,5,34/445,5,34

Tasuoxing 踏莎行 paŝo sur herbo [2-58-6] (44,7,77)x2

Taoyuan Yiguren 桃园忆故人 sopiro pri malnova amiko [2-48-8] (7,6,6,5)x2

Tianjinsha 天净沙 Pura sablo [1-28-5] 6,6,6,4,6

Tianxianzi 天仙子 fea kanto [1-34-5] 7,7,73,3,7

Tiaoxiaoling 调笑令 flirta kanto [1-32-6] 2,2*,6;6,6;2**,2*,6 | aAa bb cCc

Wanghaichao 望海潮 rigardo al martajdo

[2-107-11] 446,446,5,54,47/6,54,446,5,54,47

Xiangjianhuan 相见欢 ĝojo de intervidiĝo [2-36-7] 6,3,9;/3,3;3,9 | aaa bb aa

Xiaochongshan 小重山 malgranda montvico [2-58-8] 7,53,7,35/5,53,7,35

Xiaomeihua 小梅花 malgranda umefloro

[2-114-22] (3,3,7;3,3,9;/7,7;3,3,9)x2 |(aaa bbb cc ddd)x2

Xiaoxiangshen 潇湘神 feino de Hunan [1-27-3] 3,3*,7,77 |aAaxa

Xiechichun 谢池春 printempo ĉe lago [2-66-8] (46,34,45,34)x2

Xijiangyue 西江月 luno super okcidenta rivero [2-50-6] (66,7,6)x2

Yanermei 眼儿媚 ĉarma okulumo [2-48-5] 7,5,444/75,444

Yejinmen 谒金门 vizito al Ora Pordo [2-45-8] 3,6,7,5/6,6,7,5

Yexingchuan 夜行船 nokta ŝipvojaĝo [2-56-6] (7,34,446)x2

Yijiangnan 忆江南 sopir-al-sudo [1-27-3] 35,77,5

Yijianmei 一剪梅 branĉo da umefloro [2-60-6] (7,44,744)x2

Yiqin'e 忆秦娥 memoro pri palaca knabino

[2-46-6]3,7,3*,44/7,7,3*,44 | aaA xa/ aaA xa

Yishaonian 忆少年 rememoro pri juneco [2-46-5] 444,55/7,34,55

Yiwangsun 忆王孙 rememoro pri princido [1-31-5] 7,7,7,3,7

Yongyuyue 永遇乐 ĉiama ĝojo de renkontiĝo

[2-104-8] 444,445,446,346/446,445,446,344

Yugezi 渔歌子 fiŝista kanto [1-27-4] 7,7,33,7

Yujia'ao 渔家傲 fiŝista fiero [2-62-10] (7,7,7,3,7)x2

Yujiexing 御街行 promeno sur palaca strato [2-78-8] (7,33,76,445)x2

Yulinling 雨霖铃 tintado en pluvo [2-103-10] 4,44,644,65,347/7,35,634,426,345

Yumeiren 虞美人 belulino Yu [2-56-8] 7,5;7,9;/7,5;7,9 | aa bb/ cc dd

Zhegutian 鹧鸪天 perdrika ĉielo [2-55-6] 7,7,77/33,7,77

Zhuyingtaijin 祝英台近 kanto pri Zhu Yingtai [2-77-7] 335,45,6434/3,65,45,6434

Zhuzhici 竹枝词 bambuoj [1-28-3] 7,7,77

Zuihuajian 醉花间 ebrio inter floroj [2-41-6] 3,3,5,55/5,5,55

Zuihuayin 醉花荫 ebrio sub ombro de floroj [2-52-6] (7,5,545)x2

Specimenoj de ĉineskoj

B (1)

§.01 Busuanzi 卜算子 aŭguristo [2-44-4] (55,75)x2

komencantino

Zamenhofa Tago 2006

—laŭ ĉinesko Busuanzi

Portreto Ava

hel-verda flago

solena datreven' de

Zamenhof-Tago

Ni sang-ĵuras por

estonta ago

Esperanto ne estas

ŝajna imago

C (4)

§.02 Caisangzi 采桑子 moruskolektanta knabino [2-44-6] (74,4,7)x2

02-1 eto

En Kolza Kampo

—laŭ ĉinesko Caisangzi

pensfluo vole vagas

inter floroj —

etaj koroj

kun flavaj rememoroj

ĉu mia karulino

kun doloroj

kaj rakoroj

vivadas en ĝojhoroj

02-2 komencantino

Je Vojkruciĝo

—laŭ ĉinesko Caisangzi

ĉe la kruciĝ' de vojo

ne hezitu

bone pretu

direkton ne profetu

se vi firmas en decid'

kaj kvietu
kaj forĵetu
konfuzajon, impetu

§ .03 Chaitoufeng 钗头凤 feniksa harpinglo [2-60-14] (3,3,7;3,3,44,1,1*,1*)x2 |
aaa;bbxbbBB

03-1 Guozhu

AMO

—laŭ ĉinesko Chaitoufeng

Dolĉa am',

juna flam'

lulis nin feliĉa gam'.

Ni ja tre

dubis ke

kiuj folis

pli ol ni ge?

Ne,

ne,

ne!

Kurta am'

pasis jam.

Etingiĝis juna flam'.

Min ja tre

ĝenis ke

ĉio iĝis

morta pase'.

Ve,

ve,

ve!

03-2 Even

ELEGIO

—laŭ ĉinesko Chaitoufeng

Armand ne

kantos re

kiel nia korife'

Portis gru'

vin sen bru'

senrevne

al ĉielblu'

Ĉu? ĉu ? ĉu !

Armand re

kantos tre
inspire de elize'.
Kontribu'
sen tabu'
daŭros via
monda influ'
plu ? plu ? Plu !

§ .04 Changxiangsi 长相思 longa sopiro [2-36-8] (3,3,7,5)x2

04-1 L. Aĉjo

Konatiĝo

--laŭ ĉinesko Changxiangsi

Mi mutas.

Vi mutas.

La kapoj ambaŭ krutas

Rigardojn ŝutas.

Pluv' gutas.

Dir' gutas.

Kaj kiam koroj flutas,

Nin ardo glutas.

04-2 lily

Atendo

—laŭ ĉinesko Changxiangsi

suspiro

deliro

turmentas min sopiro

kun kora ŝiro

inspiro

aspiro

konkeras min akiro

alia viro

§ .05 Chaozhongcuo 朝中措 pedanta klerulo [2-48-5] 7,5,66/444,66

Miĉino:

ĴURE

— laŭ ĉinesko Chaozhongcuo

Ni fosu kun verda kor'

kaj kredo, fervor'

La mond' aliĝos,

la tempo pasos for.

Sed ni restos
fidela al
li ĝis lasthor'
kaj vivos eterne
pri l' Majstro la memor'.

D (4)

§ .06 Daolianzi 捣练子 kanto de lavantino [1-27-3] 33,7,77

06-1 Zhuang

Sendormeco

—laŭ ĉinesko Daolianzi

En korto

de silent',

senĉese blovas frid-vent'.

Ne povas dormi dum nokt',

nur pro sonorila pent'?

06-2 sam

Acidaj Vinberoj

—laŭ ĉinesko Daolianzi

vinberoj

alt-pendas

vulpon pike turmentas

ĝi ating-saltas vane

“acidaj!” ĝi lamentas.

§ .07 Dianjiangchun 点绛唇 ruĝigitaj lipoj [2-41-7] 47,4,5/45,34,5

07-1 lily

Rozaj Lipoj

—laŭ ĉinesko Dianjiangchun

ŝiaj lipoj

rozetaj kaj altiraj

al aspiraj

koraj viraj

avidaj je

ravoj eniraj

kun ĝemkri'

ĝojoj ŝiraj

vokoj senspiraj

07-2 komencantino
Vento el Okcidento
—laŭ ĉinesko Dianjiangchun
forte blovas
vento el okcidento
en momento
de arb-lamento

la folioj
kun ŝira sento
faladas
en silento
pro vent-turmento

§ .08 Dieliahua 蝶恋花 papilio super floroj [2-60-8] (7,45,7,7)x2
08-1 lily
Korŝira Pento
—laŭ ĉinesko Dieliahua

ekvekiĝis pro pento
mi dolore
en trista sento
mian amaton konis
mi en misa renkonto

li ŝajnis en prudento
bonkondata
kiel bel-gento
ve! la insida tento
min lasis en lamento

§ .08-2 ardo
Postsigno de amo
—Laŭ la ĉina melodio Dieliahua

En fruprintempo frida
Mi vojaĝis
Sudlandon celitan.
mi vidis ŝin avida,
okazis l'amo konfida.

Tre svelta kaj sorĉita
La fraŭlino,

Anĝelo rida,
Ho, kial vi jam glita ,
Nur vundo turmentita .

§ .09 Dingfengbo 定风波 subigo de ŝtormo
[2-62-11] 7,7;7,2;7;/7,2;7;7,2;7 | aabba/ccdeed
eto
Kaptuko Ruĝa
—laŭ ĉinesko Dingfengbo

en homamas' movplena
en flu' bicikla ĉena
kial en tia loko
moko
min igis tre ĉagrena

jen flagras ruĝa tuko
juko
ektuŝis mian koron
ŝi staris ĉe la vojo
ĝojo
vringis mian memoron

F (2)

§ .10 Fendieer 粉蝶儿 papilio [2-72-8] (10,34,334,36)x2
10-01 Miĉino:
Papilio
— laŭ ĉinesko Fendieer
Post pluv' la floro fariĝis rara,
en ĝarden'
februara.
Pliiĝas
soleco
buduara.
Demandas
ŝi kun pens' amara:

"Kial flugas, papilio kara,
nun trans la
mur' senbara?
Dubinde,
ĉu kaŝas
sin ĉijara

printemp' nur
en hejmo najbara?"

10-02 Sero
Bunta Papilio
—laŭ ĉinesko Fendieer

bunta papili' de flor' al floro
flirtadas
kun ĝojkoro
leĝere
frivole
por esploro
okula
sen ajna laboro

la flugilojn ĝi por vanta gloro
etendas
kun adoro
al ŝajna
florpompo
ne favoro
al ĝi, fi!
tenu ĝin de foro

§ .11 Fengrusong 风入松 vento inter pinoj [2-76-8] 7,5,734,66/ 7,5,77,66

11-01 lily
Fortika Pin'
—laŭ ĉinesko Fengrusong
al mi plaĉas dika pin'
pro amor-inklin'
vervoplene,fortike
erekta
kiel fer-spin'
en amĝua groto
ĝis ĝojĝema kulmin'

ĝin adoras ĉiu in'
kun pia kapklin'
ve, ne ĉiuj pinarboj
same duraj kun obstin'
kolapsas aŭ falas
laŭ natura destin'

§ .11-02 Komencantino

Inter Du Kverelantoj
—laŭ ĉinesko Fengrusong

Azenon ŝtelis kaŝe
el dom' vilaĝe
sukcese du friponoj.
Pri l' besto
jen malsaĝe
ili ekkverelis,
post disputo, kraĉe

blasfemis alvizaĝe,
eĉ batis draŝe.
Dum ti' fripon' la tria
alvenis eĉ kuraĝe,
kondukis azenon
al foro laŭplaĉe.

(adaptita el Ezopa Saĝo de Kalocsay)

G (2)

§ .12 Genglouzi 更漏子 kanto de akva horloĝo en nokto
[2-46-8] 33,6;33,5;/33,6;33,5 | xaa;xbb/xcc;xdd

Miĉino:

Primavero

— laŭ ĉinesko Genglouzi

Finiĝas
la pado
en nuba blokado.
Jen kaj jen
ekfaloj
de rozpetaloj.

Samkiel
rivero
longas primavero.
Meditas
poeto
en kabineto.

§ .13 Guizhixiang 桂枝香 aroma laŭrbranĉo
[2-101-10] 4,54,64,734,444/7,54,64,734,444
Komencantino

Aroma Osmanto
—laŭ ĉinesko Guizhixiang
osmantfloro
kun delikata
bonodoro
sin vestas en flave
ora koloro
en zefiro aŭtuna
vi skuas
en rid-gloro
allogante
abelaron
por laboro

gepar' vin per adoro
ŝatas pasie
kun fervoro
ĝuas vian aromon
ĝis sat-angoro
ĉasas unu alian
ĉirkaŭ vi
en malforo
kun arĝentaj
rid-serioj
en sonoro

H (5)

§ .14 Haoshijin 好事近 proksimiĝas bona afero [2-45-4] 56,65/75,65

14-1 Miĉino:

Salikfloroj

— laŭ ĉinesko Haoshijin

Pompa printempo.
Sur ĝardena pado.
flugas kun zefiro
jen miriado

da flirtaj salikfloroj
kaj per kisado
nin atakis, venkis
la kis-invado.

§ .14-2 Sero

Unufoja Flugvojaĝo
—laŭ ĉinesko Haoshijin

korptreme ŝvite
per fluga vojaĝo
kun saltbatanta kor'
sen ajn kuraĝo

ĉio en danĝero granda
kial en kaĝo
mi min donas vole
sen viv-domaĝo

§ .15 Heshengchao 贺圣朝 gratulo al sankta dinastio [2-49-6] 7,5,75/44,5,75

Miĉino:

Drinku

— laŭ ĉinesko Heshengchao

Bedaŭras pri hararo
spegul' en halo
matene nigra, sed nun
sub neĝvualo.

Do, ne lasu
ke l' pokalo
sub lunkristalo
restu nur duonplena
en karnavalo!

§ .16 Hexinlang 贺新郎 gratulo al novedzo
[2-116-12] 5,344,76,7,78,33/7,344,76,34,78,33

Komencantino

Ĉina Nupto

—laŭ ĉinesko Hexinlang

ruĝa koloro
simbolas
feliĉegon
laŭ la moro
ĉina nupt' ruĝ-farbita
— nacia trezoro
novedzin' kiel floro
novedzo bonaspekta
debutiĝos en honoro

feliĉe
en gloro

en nuptofesta horo
amikoj
kaj parencoj
el lok-foro
prezenti mon-donacojn
kun benad' en hxoro
orgi' en
bonhumoro
ĝis plena ebriiĝo
ĝis kontenteco en koro
ĝis taga
aŭroro

16-2 lily
Mi Rajdis
—laŭ ĉinesko Hexinlang

en geiĝa ĝu'
li pozis
min rajdi sur
lin per instru'
li eniris min tuje
jen kun gargara bru'
lin mia valvo kaptis
lubrikite per suka flu'
ektreme
la bambu'

rigide etendis plu
ĝemkrie
el ni ambaŭ
en la tru'
bruladas lia kaco
ekspasmas en sku'
“movu, beb'!”
je la situ'
sida mi movis supren
malsupren sen ajna tabu'
ververa
ge-kongru

§ .17 Heyebei 荷叶杯 lotusfolia taso [1-23-6] 6,2;3;7,2;3 | aab ccb

komencantino

Ĉe Pramejo

—laŭ ĉinesko Heyebei

rivero senbare

klare

forfluas

inter ondada skvamo

pramo

tang-skuas

§ .18 Huanxisha 浣溪纱 silk-lava rojo [2-42-5] 7,7,7/77,7

Maŭnan:

Nokte

— laŭ ĉinesko Huanxisha

Nova lun' sur firmament',

reve mi jam sur krescent'

vagas tra la stel-torent'

Ĉu vi dolĉe dormas nun?

Mi do remas en silent'

vian songon post moment'.

J (3)

§ .19 Jiangchengzi 江城子 riverborda urbo [2-70-10] (7,3,3,45,733)x2

komencantino

Papilia Kiso

—laŭ ĉinesko Jiangchengzi

mi papilian kison

deziras

akiras

mia amat'

ĉu mi deliras

en songo? via kis' min

altiras

inspiras

vi foren por nombrilo

foriras

mi miras

mia amat'

ke eĉ vi ŝiras

mian koron sence
ho ve mi
suspiras

§ .20 Jiangnanchun 江南春 printempo sude de rivero [1-30-3] 33,55,77
sam
Kapti Tigridojn
—laŭ ĉinesko Jiangnanchun

la homo
kun bravo
akiros idojn
en tigra kavo
dum ne malkuraĝulo
povus kun tia havo
不入虎穴，焉得虎子

§ .21 Jianzi Mulanhua 减字木兰花 mallongigita melodio magnolia
[2-44-8] 4,7;4,7;/4,7;4,7
Shi Chengtai:
Ĉu pri kiso
— laŭ ĉinesko Jianzi Mulanhua
Telefono!
ĉiam de l' vira sono.
Jen skrupuloj
de mi en la okuloj:

"Rendevuo
atendas vin? Vakuo
al mi lasas..."
"Ne!" via kis' amasas.

K (1)
§ .22 Ku-xiangsi 酷相思 profunda sopiro [2-64-10] (7,33,8,33,33)x2
22-1 Miĉino
Al Kara Jariĉ
kiu benetiktane mempage
pilgrimis al la Jarcenta jubilea UK
(1987-07-26)
— laŭ ĉinesko Ku-xiangsi

Al homo eminenta
misio turmenta —
Pilgrimado monumenta,

penado silenta,
penado talenta !

Vojaĝ' transkontinenta,
sukceso kontenta !
Por jubileo jarcenta,
rekordo legenda,
heroo legenda !

22-2 lily
Ret-Amo Romantika
—laŭ ĉinesko Kuxiangsi

mi ardas per sentflamo
de bela
ret-amo
sen reala amor-dramo
nek kun ajn
balzamo
de sekso
cunamo

sed ne mankas sent-lamo
tutkorpa
je samo
kiel ge panoramo
jukema
inflamo
bruladas
ĉe mammo

L (3)

§ .23 Langtaosha 浪淘沙 ondo lavas sablojn [2-54-8] (5,4,7,74)x2
komencantino
Impreso pri Hainan
—laŭ ĉinesko Langtaosha

ondada lulo
sen nebulo
svarmas hom-akumulo
sidas, staras sur plaĝo
de insulo

mara spegulo

sen makulo
libere en lazuro
gaja ludo, amuzo
sen regulo

§ .24 Linjiang-xian 临江仙 feo ĉe rivero [2-56-6] (66,7,55)x2
lily
Sopiro
—laŭ ĉinesko Linjianĝiang

Ĉu vi ja memoras?
karnavala balo
kantad' de najtingalo
freneza ludo
sata regalo

nun ĉio forpasis
belo en vualo
kaŝiĝis en ĝangalo
ne idealo
nure fatalo.

§ .25 Litingyan 离亭燕 hirundo ĉe kiosko [2-76-8] (66,76,56)x2
25-1 eto
Hirundo kaj Hundo
—laŭ ĉinesko Litingyan

enkorte sur branĉet'
ĉirpas triste hirund'
forpelata kruise
de flavkolora hund'
ili malpacas
pri herbtigoj kaj grund'

por nest' ŝi volas jen
teron en malabund'
por regno li tiranas
kun kontenta profund'
fine nature
ŝi forfuĝas kun vund'

25-2 komencantino
Amo kaj Ĉagreno

—laŭ ĉinesko Litingyan
amo kaj ĉagreno
ligiĝas per ĉeno
kiam akordas paro
estiĝas kompreno
inter geuloj
sen ajn mensa spleno

en ama edeno
de feliĉa pleno
okazas ofte malpac'
kun morta veneno
ĝis korŝiriĝo
sen ama reveno

M (2)

§ .26 Manjianghong 满江红 rivero plenruĝa
[2-93-9] 434,344,77,353/33,33,54,77,353
eto

Omaĝe al Zamenhofa Tago
—laŭ ĉinesko Manjianghong
malfacile
forpasis
jam jarcento
plena je
brava, spita
prominento
plenkreskas nia lingvo
ja per via talento
surbaze
de Fundamenta
idento

ĉe festa
momento
en sankta
silento
ni adeptoj firmaj
kun konsento
omaĝas benojn belajn
vide al firmamento
respekte
al vi, kun pia
am-sento

§ .27 Moyuer 摸鱼儿 fiŝado [2-116-13] 346,76,3,37,4,545/36,6,76,3,37,4,545

lily

Amludo

—laŭ ĉinesko Moyuer

geparaj

amludantoj

por ama laboro

kveras birde en brakoj

kun batanta koro

odoro

balzama

venkas ilin enĥoro

man-esploro

spasma trakorpen

komencas jen

l' ekscita horo

tutnude

agitis fervoro

en soif-angoro

malmolas birdo, softas

kav' en bonhumoro

trezoro

volupta

emergas en disfloro

kun ĝojploro

birdo en kavo

ĝemkriado

ĝis kulmin-foro

N (3)

§ .28 Nangezi 南歌子 suda kanto [1-23-3] 55,7,9

28-1

Nikolao Kurzens (1910-1959)

VEKI VERON

Mi volas veki,

Veron informi

ne nur senvole dormi

Estu la viv' ne per sed por mi.

28-2 Komencantino

Vulpo kaj Masko

—laŭ ĉinesko Nangezi

Surkampe maskon
la vulpo trovis.
Ĝin ja ne koni povis,
por pririgardi turnis, ŝovis.

Li do rikanis
en ton' acerba:
"Bela kap', sed sencerba,
nur kuŝas sur la tero herba."

(adaptita el Ezopa Saĝo de Kalocsay)

§ .29 Nanxiangzi 南乡子 sudlandano [2-56-8] (5,7,72,7)x2
sero
Jarfine
—laŭ ĉinesko Nanxiangzi

pensoj en pelmel'
kia lernada nivel'
kiel statas situaci'
la cel'
jam gutis tra cerb-funel'

ridetanta hel'
kun pli granda forto-pel'
avancu por pli alta
model'
sed ne ĉiela kastel'

§ .30 Niannujiao 念奴娇 ĉarma kantistino
[2-100-8] 436,436,445,46/654,436,454,46
Komencantino
Dediĉe al Ĉineska Rondo
—laŭ ĉinesko Niannujiao

en aŭtuno
orflava
rikolta sezono
en Elerno
helverda
ĉinesk-regiono
etpoemoj
etaj krioj

el jun-burĝono
anticipe
ĝis riĉa fruktdono

furioza vento
ne povas skui
kun bru-sono
vian bazon
stabile
staras kiel ŝtono
vi, kresku, kresku
silenteme
sen fanfarono
iam onte
por monda dispono

P (2)

§ .31 Pozhenzi 破阵子 kavalira danco [2-62-6] (66,77,5)x2

Miĉino:

Al Batalo

— laŭ ĉinesko Pozhenzi

Rigardu: ekbrulas

alarma signalo.

Pretigu nian glavon

kaj rajdu sur ĉevalo,

ek al batalo!

Niajn malamikojn

punu mortfatalo.

Triumfe ni jubile

tostu en bakanalo

per grandpokalo.

§ .32 Pusaman 菩薩蛮 budhista dancisto [2-44-8] 7,7;5,5/5,5;55 |aa bb cc dd

Miĉino:

Antaŭ nova jarcento

— laŭ ĉinesko Pusaman

Antaŭ l' nova jarcento,

je celebra momento.

Vi, korifée

kaj jubilee,

laŭdis per kanto

pri Esperanto---
Lingv' nia kara,
june centjara.

Q (4)

§ .33 Qingpingyue 清平乐 serena muziko [2-47-7] 4,5,7,7;/6,6,66 | aaaa bxb
eto

Unua Amo
—laŭ ĉinesko Qingpingyue

papilio
kun emocio
falas sur kamelio
pro ama nostalgio

inta korinklino
ne al ŝia sino
neniel, neniam
pro viva destino

§ .34 Qingyu' an 青玉案 verdjada taso [2-68-8] (7,33,7,445)x2

Miĉino:

Lanterna tento
— laŭ ĉinesko Qingyu'an

En nokta firmamento
miraĝa
prezento
de l' orienta vento.
Ĝi faligis
blove pluvojn
da steltorento.

Dancas ora serpento
tra fajraĵa arĝento
ekstaza violento.
Senkompara
festivala
lanterna tento.

§ .35 Qinyuanchun 沁园春 printempo en la Ĝardeno Qin

[2-114-9] 444,5444,447,354/6,35,5444,447,354

lily

En Edeno de Virgulino

—laŭ ĉinesko Qinyuanchun

mi langvore
kuŝas teda
en l' edeno
silkan korpon mi
mole palpas
pinĉ-karesas
kun kor-ĝeno
tikle, tikle
mi ne scias
kie venas ĉagreno
mi volas
eksplodi ĝue
sen sinteno

la man' en promeno
falglitas
suben sen peno
mi soifeme
tuŝas softan
fendon karan
kun ĝu-veno
ho ekscita
trem' trakuras
korpon kiel fadeno
kulmine
orgasm' eruptas
sen kateno

§ .36 Queqiaoxian 鹊桥仙 feino sur piga ponto [2-56-4] (446,734)x2

Miĉino:

Jad Rakontis

— laŭ ĉinesko Queqiaoxian

En pluvtago
Jad rakontis
al ni anekdoton,
ke ĈEE intencis
inviti
faman skoton

elĉinigi
la romanon

(por spici ekzoton?)
"Sonĝo en Buduaro",
forgesi
patrioton!

R (3)

§ .37 Renyueyuan 人月园 rondiĝo de luno kaj homoj [2-48-4] 75,444/444,444

Guozhu

Al Amiko

— laŭ ĉinesko Renyueyuan

1.

Eterne memorinda

nova vivpaĝo!

Jubileo

de kvindeka

ora aĝo

en amika

Japanio

dum verdhaĝo!

Mi atendas

ke vi versu

pri l' vojaĝo.

2.

Revenas vi jam de la

vojaĝ' amika.

Freŝe restas

la impresoj

ekzotika.

Mi ĝojas ke

vin favoras

ŝanc' unika---

rekompenco

de multjara

viv' stoika.

(1989)

§ .38 Ruanlanggui 阮郎归 reveno de amato [2-47-8] 7,5,7,5/33,5,7,5

38-1 eto

Flut-Melodi' en Nebulo

—laŭ ĉinesko Ruanlanggui

aŭdiĝas flut-melodi'
kiel idili'
tra nebula iluzi'
kun melankoli'

paseo
emoci'
lasita sen sci'
en pasinta histori'
ree nostalgi'

38-2

Hendrik Adamson (1891-1946)

RAVA HOR'

—laŭ ĉinesko Ruanlanggui

Ho,ĉi tiu rava hor',
de volupt',ador',
kun senlima ĝoj', dolor'
gaja rid' kaj plor'.

kaj verva
amfervor'
ĝis ekkrev' de kor'
kaj sekve post ĝi langvor'
dolĉa rememor'.

(adaptita de Guozhu laŭ Esperanta Antologio p.258/259.)

§ .39 Rumengling 如梦令 kvazaŭsonĝe [1-33-5] 6,6,56,2,2*,6

Guozhu

Al Kara Armand

— laŭ ĉinesko Rumengling

1

Kantas en Esperant'
pri am' al Patroland'
eĉ en la prison'
de Kvarpersona Ban''.

Armand,

Armand,

nefleksebia gigant'!

2

Vin gloru versgirland',
ĉielarka ruband',
ring' el papavoj
ĉar, laŭ muza komand'

Armand,
Armand,
jam versos el felan”!
1990-09-30

S (11)
§ .40 Santaici 三台词 tri terasoj [1-24-2] 66,66
40-01 Miĉino:
Gardanĝelo
— laŭ ĉinesko Santaici

Kara, se vi estus
mia gardabĝelo;
estos plej feliĉa
mi sub la ĉielo.

40-02 Komencantino
Nur Unu, Sed...
—laŭ ĉinesko Santaici

Vulpo al leono
diris kun mokrido,
“Al vi ja naskiĝas
nur po unu ido.”

La leon’ respondis
firme kun decido,
“Pravas vi. Nur unu,
sed leon’ kun fido!”

(adaptita el Ezopa Saĝo de Kalocsay)

§ .41 Shanhuazi 山花子 monta floro [2-48-5] 7,7,73/77,73
41-1 Guozhu:
Ruĝa Umefloro
— laŭ ĉinesko Shanhuazi

La ruĝa umefloro
spite al frostrigoro
disfloris frue en la
vintrhor.

Ĉar al malfruiĝinto
jam neniam adoro

premier. Atendos nur
ignoro.

41-2 Komencantino
La Akuŝanta Monto
—laŭ ĉinesko Shanhuazi

La mont' akuŝis lite
ĝemegis intermite.
Atenta muto peza,
ekscita

atend' kaj mirkonfuzo.
Ho, alvenis subite
informo: mus' naskiĝas
elglite.
(adaptita el Ezopa Saĝo de Kalocsay)

--

41-3 Komencantino
La Instruo de la Cervino
—laŭ ĉinesko Shanhuazi

Cervin' instruis al l' id',
“Estu kuraĝa kun fid'
je via fort' de kornoj.
Sen timid',

je hunda boj', ne timu!”
Sed cervin' mem kun perfid'
ĉe boj' proksima fuĝis
en rapid'.

(adaptita el Ezopa Saĝo de Kalocsay)

§ .42 Shaonianyou 少年游 vojaĝo en juneco [2-50-5] 7,5,445/75,445
eto
Vilaĝ' en Neĝo
—laŭ ĉinesko Shaonianyou

kovras neĝo en vilaĝ'
ĉion en sovaĝ'
videblas nur
senvivejo
nebula miraĝ'

en blanko sen animo
purpura pejzaĝ'
pacience
ni sopiras
al printemp-aĝ'

§ .43 Shengshengman 声声慢 lanta sontreniĝo
[2-97-10] 4,46,64,634,336/6,36,46,634,37

Guozhu:

Morna Poetino

— laŭ ĉinesko Shengshengman (Lanta son-treniĝo)

Sibla vento
silka pluvo
ĉagrena momento.

La sun' jam falis al
okcidento.

En aŭtunan korton
invadas
frostetendo.

Solece
rigardas
al la firmamento.

en vana atendo,
sidante
ŝi kun sentimento
de izolo
sub obskura tendo.

Morna poetinon
subpremas
korturmento
ke daŭras
sufoke trist-silento.

§ .44 Shengzhazi 生查子 monta kratago [2-40-4] (55,55)x2

Marjorie Boulton (1924-)

VENI BILDE

Sur gramofono
muzik' banala.
Sezono vintra,

malvarme pala.

Vi venis bilde
en hor' banala,
milde ridetis
ĉiam lojala.

adaptita de Guozhu

§ .45 Shiliuziling 十六字令 dekses-silabo [1-16-3] 1,7,35
45-1 Mao Zifu (1963-)

PENSEA KONFESO

— al s-ano Shi dum la alveno de la 50a n-ro de nia revueto Penseo
temp'

flugas for el pen-kontempl'

ne! ĉe vi

restas ben-printemp'

re

freŝas velka mi kaj tre

viglas nun

spite al bore'

se

mankus flego de vi, ve,

nu, jam mi

dronus en pere'

temp'

flugas for el ben-kontempl'

ne! ĉe vi

regas bluprintemp'

1994-06, Changde

45-2 lily 2006-12-7 9:54:39

Trista Am'

—laŭ ĉinesko Shiliuziling

am'

min turmentadis per flam'

mi perdis

freŝan junon jam

am'

senigas tute ĉiam
terure
min je ĝoja gam'

am'
l' epiteto de fifam'
allogas
nure mia mam'

§ .45-3 lily
Trilogio de Litludo
—laŭ ĉinesko Shiliuziling
ĝu'
per kares' kaj langmordet'
kaj korpglu'
ĝis sukplenas tru'

ĝem'
lin ekscitas al bor-mov'
kun sent-trem'
ĝoja al ekstrem'

kri'
en lia forta piŝtad'
ho al li
rava iluzi'

§ .46 Shuyidiaogetou 水调歌头 preludo de akva melodio
[2-95-8] 55,65,665,55/333,47,665,55
46-1 Guozhu
Je Mia Ora Jubileo
— laŭ ĉinesko Shuidiaogetou
Post pen' senlaca
kaj diligenta,
post hardado neĝa,
pluva kaj venta,
venas jubileo
de esperantistec'
duonjarcenta---
tag' memorinda,
horo eventa.

Temppaso
ŝajnas nur

momenta;
sed har-nigro
nun jam iĝis arĝenta.
Kun nova fervor' mi
marŝu kun kolegar'
sur voj' kunsenta,
en koro tajdas
ĝojo torenta!
(2006-04-15)

46-2 Hosemo
Al Hu Guozhu
— laŭ ĉinesko Shuyidiaogetou
Aŭtuno venas,
Blovas zefiro.
Kiam luno plenas,
Restas suspiro.
Vi kiel fakiro
Senlace ja penas
Kun la aspiro.
Ĉineskon tenas
Vi pioniro.

Al Viro
Mi benas
Per liro.
Vin ĉagrenas
Vi por bela inspiro.
Kiu vin komprenas?
Ho, via rapiro,
Bela satiro!
Mi sole splenas,
Pro la sopiro.

§ .47 Shuilongyin 水龙吟 akva drako
[2-102-9] 67,444,444,5433/6,34,444,444,544
lily
Tordiĝo en Sofo
—laŭ ĉinesko Shuilongyin

furioza dramo
okazas de am-horo
koketiĝo
karesado

por amoro
senvestado
brakumado
en ĝoj-horo
birdo ekduras
truo cedas
alloga
odoro

ekas klak-sonoro
de sofo
kun fervoro
mammordeti
man-esplori
sen doloro
ĝemkriadi
brue spiri
pro enboro
tordiĝ' en sofo
por geĝui
jen el koro

§ .48 Siyuanren 思远人 sopiro pri for a homo [2-51-5] 75,445/7,5,545
Guozhu:
Honfan pasis for
— laŭ ĉinesko Siyuanren (Sopiro al fora homo)

Fulmotondra informo!
ŝokas min ĝis plor'
Mi ne povas
kredi, ke vi
Honfan pasis for!

Restas en mia memor'
Vi ĉiam Mentor'
Via EĈV
kaj EPC
kronas vin per glor'!

§ .49 Sumuzhe 苏幕遮 virina ĉapo [2-62-8] (33,45,7,45)x2
Miĉino:
Aŭtune
— laŭ ĉinesko Sumuze

Nubiĝa
ĉielo.
Sub senĉesa
ventblova pelo,
folioj en pelmelo
